

# *Havano survoje al sia 501-a jubileo*



**San Francisko de Asizo en Havano**

La kuba ĉefurbo estis fondita en 1519 kaj en 1982 ĝi estis deklarita de UNESCO kiel Kultura Heredaĵo de la Homaro. Havano situas en la nordokcidento de Kubo ĉe la samnoma ĉefa komerca haveno. Ĝi etendiĝas sur surfaco je 750 km<sup>2</sup> kun proksimume 2,5 milionoj da enloĝantoj. La Malnova Havano estas la plej antikva parto de la urbo kaj ĝi konsistigas arkitekturan ensemblon de la jarcentoj 16-a ĝis 19-a, kies koloniaj palacoj kaj aliaj juveloj estas zorge restaŝrataj.

Post kelkaj tagoj, la iama vilaĝo de Sankta Kristorofo de Havano festos sian 501-an fondo-datrevenon, tial ke la 16-an de novembro 1519 oni celebris la unuan meson kaj kunsidon, historia momento rekonata kiel fonda aranĝo de nia urbo, kiu hodiaŭ ne ĉesas allogi siajn loĝantojn kaj vizitantojn per ties elegantaj palacoj, artismaj kradoj kaj la ĉiutaga bruo de ĉiaj stratetoj, kiuj transdonas koron de urbo forŝita per realoj kaj esperoj de tiuj kiuj igis ĝin magia kaj ĉarma.

Por eternigi la historian momenton de la urba starigo ĉe la havana haveno sub fronda arbo, la guberniestro Francisco Cajigal de la Vega konstruigis en 1754 kolonon trivizaĉan kiu portas en la bazo du enskribaĵoj ankoraŭ legeblaj, en la latina kaj kastilia lingvoj, aludantaj tiun okazaĉon.

En la dekstra flanko de la kolono staras la legenda arbo, ceibo, posedanta kvazaŭ mitan aĉron kiu memorigas tiun arbon kio originis kontraŭdon de la Templeto, la monumento tie staranta, kiu estis konstruita en 1823.

La monumento estas ĝirkaĝita de sobraj kradoj kun portiko kaj kolonoj, kunformanta reproduktaĝon bone skizitan per arta sendo de la greka arkitekturo klasika.

Tuj apude troviĝas statuo de la admiralo Kristoforo Kolumbo, la eltrovinto de la amerika kontinento, kiel lin nomis la hispanoj, kaj supre de la kolonoj ĝe la enirejo, oni povas vidi ananasojn skulptitajn en fero, kvazaŝ memorigilo de la tropika frukto plej ĝatata de la eŝropanoj, kun ĝiaj stilformaj kronaĝoj kiuj agnoskas ĝin kiel reĝino de la kubaj fruktoj.

En la interna parto de La Templeto oni trovas tri grandajn oleo-pentraĝojn de la franca pentristo Jean Baptister Vermay, deantaĝnelonge restaĝritaj, aludantaj la personecojn ĝeestintajn la ceremonion de la urbo-naskiĝo.

ĝiun 16-an de novembro ariĝas en tiu legenda loko, havananoj kaj vizitantoj por realigi tradician pilgrimadon ĝis tiu ejo, kie la urbaj aĝtoritatuloj okazigas specialan ceremonion kaj alparolas pri la historio kaj nuntempo de la urbo.

Dume, kaj poste oni rondiras la arbon kaj tuĝas ĝin pledante por forigi malbonsorton aĝ por peti favoron, kio konsistigas tradician ceremonion kiu renovigas la havanan fidon kaj animon.

Pro tio, ĝi-foje, spite al la defioj de la pandemio kun higienaj reguloj, la magia kaj eleganta urbo, festos sian 501-an fondodatrevenon renovigante sian animon, agante por refari la urbon kaj eltiri ĝin el polvo kaj fero, al beleco de ĝiaj promenejoj kaj parkoj, kaj fidela al la deziroj de tiuj, kiuj fidas ĝin kaj salutas ĝian patronon Sankta Kristoforo.

---

<https://www.radiohc.cu/eo/de-interes/caleidoscopio/239415-havano-survoje-al-sia-501-a-jubileo>



**Radio Habana Cuba**